

"Ludwig Lazarus Zamenhof, aùtoro de Esperanto (1859-1917) plenumis
maturulo, kion, infano, li revis ..."
(el "Saluton al Zamenhof", Clarkson Crane (SFERO, Dec. 1967)



D-ro L. L. Zamenhof - 1859-1917
Kreinto de Esperanto

- Drawing by Laura Drejser

Jen! de via genieco la centmil fajreroj
Falis, kaj flagretis sur diversaj lokoj.
Iuj sufokiĝis en malpuraj atmosferoj,
Iuj estingiĝis sur la nudaj rokoj.
Tamen laù la nevidataj vojoj rampebrulos,
Kuniĝonte, la flametoj de l'espero –
Ĝis la finbriladon eĉ la steloj respugulos,
Por konservi vian lumon sur la tero.

"Memore al Zamenhof" de Brendon Clark, el
la libro *Kien la Poezio?*

"Sur nia malgranda globo, homoj ne plu povas vivi kiel fremduloj... Nia preĝo estas ke homoj ĉie finfine lerni vivi kiel fratoj en reciproka respekto por siaj diferencoj, por kuraci la vundojn unu al la alia, por antaŭenigi progreson de ĉiuj, kaj ke ĉiu profitu de la komuna scio!"

– Adlai Stevenson, UNA-USA (translated from English)

Nia Devo Antaŭ Zamenhof

...Ni estas malmultaj, kaj la tasko estas granda, sed ni laboras por lingvo kaj idealo tiel gravaj kaj tiel signifaj, ke ni nek rajtas nek povas laciĝi aŭ deflankiĝi. Kiel lernintoj de Esperanto, kiel eltrovintoj de tiu miraklo de a homa komunikado, ni tiris sur nin, vole- nevole, la moralan devon antaŭ la mondo ĝin disvastigi kaj ĝin sukcesigi.

..Nia mondo veas sub la battoj de homa kruleco, de krizoj, de militoj. Kiel parolantoj de la Internacia Lingvo, ni havas devon, antaŭ nia lingvo, antaŭ ĝia kreinto Zamenhof, labori por nova, pli komprenema, pli vivoplena, pli bela mondo. [Humphrey Tonkin, parolado dum la inaŭguro de la 64a Jniversala Kongreso, Lucerne]

ZAMENHOF

La tutan tempon, super Esperanto,
kun sinofer' patrino kaj mesia,
li ŝvitis: ĝin li, konstruist' magia
masonis; liaj ŝultroj de giganto

el vortminejo, en preciza kvanto,
sin servis, ke ĝi staru rektlinia!
Li vivis ĝin; eĉ vivo profesia
sin ŝovis al li, en deviga hanto!

Ĉar, dediĉinte sin al la kuraco
okula, novan lumon li liveris
al blindaj, dum la tuta tag', sen laco!

Kaj nokte, per tradukaj proz' kaj verso,
kaj per originalaj, li konkeris
spiritan lumon por la universo!

– El "Alegro" en *Arĉoj de Geraldo Mattos, Brazilo*

Sur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras."

– L.L.Z. el *Proverbaro Esperanta*

Kiam Naskiĝis la Majstro

Legendo diras ke kiam sur la tero naskiĝas nova vivo, en ĉielo ekbrulas lampeto. La lampeto brulas tiom longe, kiom daŭras la koncerna vivo sur la tero. Sed mi imagas pli. Kiam naskiĝas nova homo, malfermiĝas por li libro, en kiu enskribiĝas ĉiuj liaj faroj. Bonaj – sub signo plus, kaj malbonaj – sub minus. Kaj kiam la lampeto en ĉielo komencas paliĝadi, anoncanta la baldaŭan finiĝon de la surtera vivo, ĉiuj pluroj kaj minusoj sumiĝas. Kiam la mortinto venas en Postmondon, oni lin atendas ĉe la pordego kun preta finkalkulo.¹ La plusuloj iras dekstren en paradizon, la minusuloj – maldekstren.

Tiu ĉi mia persona fantazio, kiun mi kutime rakontas al infanoj, eble ne decas por seriozaj plenkreskuloj...Tamen...

Kiam naskiĝis Zamenhof, malfermiĝis lia libro. Sur ĝi, kvazaŭ per ies nevidata mano, skribite estis: LIBRO DE GLORO - EN DOLORO. Kaj efektive, sur grizaj paĝoj de la libro enskribiĝadis lia vivo en doloro - por gloro. Zamenhof venis en la mondon kun interna fajro, kiu puŝadis lin, peladis, kiel sklavon, sur piedestalon de gloro tra dornoj de la griza vivo. Ĉiu homo ĉe sia naskiĝo ricevas kvazaŭ dote sian destinon. Sed ne ĉiu poste fariĝas tiu laŭ la destino. Kaj jen skulptisto ofte pli bone "botistas" ol skulptas, dentisto pli bone "tajloras", juristo... "kuracistas", lingvisto... "okulistas", kaj tiel plu. Kaj en tio ĉi kuŝis la doloro de la vivo de Zamenhof, ke genia, inspirita lingvisto devis... "okulisti".

La fajro, la destino pelis lin al idealo, sed la prozo de la vivo vokis al realo. Kaj kiam lia lampeto en ĉielo ekanoncis la estingiĝon de lia vivo, kiam la okuloj de Zamenhof fermiĝis kaj la koro haltis - en lia libro estis unu sola minuso. Tiu ĉi minuso estis - ke, mem nobla, li blinde kredis kaj fidis je nobleco de homoj, al kiuj li oferis la tutan realon de sia vivo, tutan ĝian ĝojon. Kaj kiam fermiĝis super li la freŝa tombo, homoj eksentis grandan domaĝon, pezan riproĉon, ke ili ne sciis gajigi la vivon de sia Majstro. Vekiĝis la konscio, sed tro malfrue...

– el *Verkoj de FEZ.*

¹ Kiel per granda komputilo? – Red.

Zamenhof mortis 14an de aprilo 1917. En Siberia militkaptitejo aŭdiĝas la voĉo de la juna hungara militkaptito, Julio Baghy:

La famon ne brue,
Nur poste malfrue.
Simile al eĥo de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
"La majstro mortis."

– el *Gvidlibro por Supera Ekzameno, p.37*

LEO WIENER (1862-1939) - THE FIRST PROTO-ESPERANTIST IN AMERICA

by Bernard Golden

When did Esperanto come to the United States? Who founded the first local and national organizations? How was the public informed about Esperanto? When were the first textbooks and periodicals published? To the best of my knowledge, no comprehensive history of the Esperanto movement in America exists, so the story has to be reconstructed on the basis of fragmentary data from diverse sources. In this article I should like to bring out of obscurity a man who has been forgotten in the Esperanto movement. He was not an Esperantist but a proto-Esperantist, who came to America before Esperanto was made public in 1887, the year in which Dr. Ludwig L. Zamenhof published his first modest textbook known as the *Unua Libro*.

First let us determine the earliest date when Esperanto became known in the United States. In 1904 at the St. Louis World's Fair, John Fogg Twombly, with the help of European Esperanto groups, set up a stand to inform the public about the new international language. In the following year the first local club was founded in Boston with Twombly as president. The first national organization, the American Esperantist Association, also came into being in 1905. I wonder whether the members of the Boston group were aware that one of the earliest European followers of Zamenhof was residing only a stone's throw away in Cambridge, Massachusetts...but that is getting ahead of our story.

Esperanto, in fact, had been known in the United States almost two decades before the organized movement got under way. In 1887 the American Philosophical Society in Philadelphia undertook an inquiry concerning international languages and collected data about various projects. The committee appointed to examine the languages first turned its attention to Volapük, invented by the German priest Johann Martin Schleyer in 1879. Volapük was rejected by the committee which established its own principles for an ideal international language. When it was found that Esperanto had the required qualities, the secretary of the Society, Henry Phillips, Jr., translated the *Unua Libro* into English, and it was published together with the reports of the committee in 1889. Since Henry Phillips, Jr. learned Esperanto in 1887, using the French translation of the *Unua Libro*, he can be regarded as the first Esperantist in the United States. However, the follower of Zamenhof already mentioned had been in America for five years when the American Philosophical Society first dealt with Esperanto. Who was he and how did he get to the United States?

This part of our story began in Europe, in Białystok, Poland, the birthplace of Dr. Zamenhof. A boy named Leo Wiener was also born there in 1862, three years after Zamenhof's birth. Perhaps the two became acquainted while they were children in Białystok. In

1873 Zamenhof's family moved to Warsaw and Ludwig, then a teenager, entered the 4th class of the 2nd Classical Gymnasium. After having begun his secondary education in Minsk, Leo Wiener, too, came to Warsaw four years later in 1877. At that time the boys became friends although they did not attend the same school.

Ever since coming to Warsaw, young Zamenhof has been experimenting with different forms of an international language, and he had succeeded in interesting a number of his schoolmates and other friends in a language which he called *Lingwe Uniwersala*. This was the earliest form of Esperanto; Esperantologists call proto-Esperanto 1. Its first public presentation occurred just over 100 years ago on December 1 (December 5 according to the Old Style Julian calendar), 1878. Nineteen-year-old Ludwig celebrated the Day of Giving Life to the Universal Language by organizing a party at his home. The festivity, attended by his mother, brothers and sisters and six or seven members of the *Lingwe Uniwersala* group, was solemnized by the recitation of a four-line poem which is the only extant example of that early Esperanto dialect:

Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

(Zamenhof's own translation)

Malamikeco de la nacioj
falu, falu, jam tempo estas!
La tuta homaro en familion
unuigi devas.

Leo Wiener, too, was present to join in the singing. The following year the two friends were separated. After graduation from the gymnasium, Zamenhof went to Moscow to begin his medical studies at the university in the Russian capital. A year later, in 1880 Leo Wiener enrolled in the medical faculty of the University of Warsaw, but he soon found that he was not cut out for the medical profession. He then went to Germany to study engineering at the Polytechnic Institute in Berlin in 1881-1882.

In the meantime, because of financial difficulties Zamenhof had returned to Warsaw to complete his studies at the university in that city, and he received his medical degree in 1885. Leo Wiener's study of engineering lasted just about as long as his interrupted medical career. Obsessed by malaise in Europe, he began to look for greener pastures abroad. Having become a vegetarian during his stay in Germany, Wiener conceived of a plan to found a Utopian vegetarian community in British Honduras where the British government was making land available for such ventures. Wiener was joined by a fellow idealist but while on the high seas headed for Central America, certain disagreeable personal qualities of his partner induced Wiener to abandon the project of a tropical colony.

Wiener disembarked in New Orleans in 1882 and spent the next few years tramping about the south and midwest, trying his hand at various occupations and acquiring an intimate knowledge of American life. He later found his place in academic pursuits, first teaching modern languages at the University of Missouri from 1892 to 1895; then from 1896 to 1930 he taught Slavic languages and literature at Harvard in the department which he founded.

Leo Wiener apparently made no attempt to participate in the early Esperanto movement in the United States, since his name is not mentioned in any of the publications which I have been able to consult. He was a polyglot and devoted himself to a wide range of philological studies. He contributed etymologies to Webster's New International Dictionary, published a book on 19th century Yiddish literature, translated the works of Tolstoy – 24 volumes – into English, studied Bantu African languages and Indian languages of Central America, wrote on medieval Germanic laws and also investigated the gypsies. However, I know of only two articles which he wrote on international languages, both published in 1907 in a Berlin scientific weekly. In the academic community Wiener was eclipsed by his son, Norbert Wiener, the eminent mathematician and founder of the science of cybernetics.

On the occasion of the 100th anniversary of the presentation of *Lingwe Uniwersala*, it is fitting to call attention to the rôle of Leo Wiener in the early Esperanto movement. As one of the enthusiastic earners of proto-Esperanto, he encouraged Zamenhof to continue to perfect his language. As an immigrant to the United States he became the first follower of Zamenhof to reach the shores of the new world.

HENRY PHILLIPS, JR. (1938-1895)

La unua esperantisto en Ameriko

de Bernard Golden

La unua esperantisto en Ameriko, Henry Phillips, Jr. estas menciita en ĉiuj verkoj temantaj pri la tagiĝo de Esperanto-movado, kiam d-ro Zamenhof klopodis akiri oficialan agnoskon por sia lingvo tuj post la eldono de la *Unua Libro*.

Henry Phillips naskiĝis en Filadelfio, Usono, en 1838. Same kiel Leo Wiener, ankaŭ li estis judo. Li finis siajn universitatajn studojn en 1856, kaj tri jarojn poste estis akceptita en la advokatecon. Tamen, ekde la komenco mankis al li la karakteriza familia interesiĝo pri la juro, kaj li prefere dediĉis sin al antikvaĵaj esploroj, ĉefe la filologio kaj numismatiko. Phillips ankaŭ primajstris plurajn fremdajn lingvojn kaj faris beletrajn tradukojn de germana, hispana, hungara kaj itala poezio. Cetere, li okupiĝis pri la folkloro kaj arkeologio de Usono, kaj dum la lasta jardeko de sia vivo turnis sian atenton al la internacilingva demando.

Rezulte de siaj eminentaj kontribuajtoj sur la terenoj de la historio kaj literaturo, Henry Phillips estis elektita membro de pluraj klerulaj organizaĵoj. Unu el tiuj estis la Amerika Filozofia Societo (AFS) de Filadelfio, fondita en 1743 de Benjamin Franklin kaj ankoraŭ ekzistanta hodiaŭ, kun vasta agado ampleksanta ĉiujn sciencojn. Phillips fariĝis ano de AFS en 1877, sekvintjare li estis ĝia kuratoro, en 1884 li funkciis kiel unu el ĝiaj sekretarioj kaj de 1885 ĝis sia morto li okupis la oficon de bibliotekisto de la Societo.

En oktobro 1887 Henry Phillips kaj kolegoj estis komisiitaj de AFS formi komitaton kun la celo esplori la efektivigeblecon de internacia lingvo. La komitato komencis kolekti informojn pri diversaj planlingvaj projektoj kaj enketis pri sinteno de kleraj institucioj en la tuta mondo rilate alvokon de internacia kongreso por pritrakti la aferon. La unua planlingvo, kiun la komitato ekzamenis, estis Volapuko, inventita de Johann Martin Schleyer en 1879. En la raportoj publicitaj de AFS Volapuko estis ĝisfunde analizita kaj kondamnita kiel netaŭga. Male, kiam Henry Phillips ricevis la francan tradukon de la *Unua Libro* de D-ro Esperanto en januaro 1888, li entuziasmiĝis pri tiu lingvo, ĉar li trovis en Esperanto plurajn trajtojn, kiujn la komitato mem formulis por ideala internacia lingvo.

Pro ĝenerala apatio la proponita internacilingva kongreso de klerulaj societoj kaj universitatoj ne okazis. Tio ne estis surprizo por Zamenhof, kiu antaŭvidis tiun eventualecon jam en 1888 en la *Aldono* de la *Dua Libro*. Malgraŭ tiu fiasko, AFS, ĉefe pro la agado de Henry Phillips, kontribuis por konatigi Esperanton en Ameriko tuj post la lanĉo de la lingvo en Eŭropo. Henry Phillips tradukis la *Unuan Libron* en la anglan lingvon (1889) kaj verkis ankaŭ anglan-Esperantan vortaron. Li, do, estis la tria persono, kiu verkis anglan version de la unua publikaĵo en Esperanto.



Plado sur domo en Genevo, Svislando

(foto de Norman Bierne)

Post la morto de Phillips en 1895, AFS ne plu okupiĝis pri internaciaj lingvoj, kaj sekvis breĉo en la historio de Esperanto en Usono ĝis 1904, kiam John Fogg Twombly, kun la helpo de esperantistoj de la pariza grupo, starigis standon ĉe la Monda Ekspozicio en St. Louis por informi la publikon pri la nova internacia lingvo. Tamen, ĉar Henry Phillips dek ses jarojn pli frue komencis agadi por Esperanto, li sendube estis la unua esperantisto en Ameriko.

Restas ankoraŭ du demandoj. Unue, kion faris tiutempe Leo Wiener, la pra-esperantisto, kiu lernis la unuan formon de Esperanto en 1878 en Varsovio kaj alvenis al Usono en 1882? Ĉu li havis iujn kontaktojn kun AFS, kiam Henry Phillips kaj liaj kunkomitatoj kolektis donitaĵojn pri internaciaj lingvoj? Mi malkovris, ke Leo Wiener ja korespondis kun unu el ~~la~~ komitatoj, sed ne temis pri internaciaj lingvoj. La poliglota Wiener interesiĝis ne nur pri eŭropaj lingvoj; li studis ankaŭ indiĝenajn lingvojn de Ameriko, ĉefe tiujn de la indianoj de Jukatano kaj Gvatemalo. Kaj unu el la membroj de la komitata triopo estis Daniel Garrison Brinton, pionira usona antropologo kaj etnologo, kiu specialiĝis pri lingvoj de la amerikaj indianoj. En siaj aŭtobiografiaj notoj, Leo Wiener skribis, ke Brinton sendis al li kelkajn el siaj publikaĵoj kaj kuraĝigis lin rilate lian deziron iri al Mezameriko por studi antikvajn monumentojn. Ĉu Leo Wiener ne sciis, ke Brinton havis en siaj manoj la lingvoprojekton de Ludoviko, kiu jardekon antaŭe en Varsovio instruis *Lingve Uniuersala*-n al Wiener kaj kelkaj aliaj gimnazianoj?

La dua demando temas pri personaj rilatoj inter d-ro Zamenhof kaj Henry Phillips. Ĉu Zamenhof sciis, ke Phillips estas samgentano? Neniu verko en Esperanto, kiun mi ĝis nun legis, aludas la judecon de Phillips; tiun fakton mi ĉerpis el anglalingva biografio pri la filadelfiano. Se Zamenhof estus sciinta tion, li plej verŝajne estus menciinta ĝin en unu el siaj skribaĵoj. Ekzemple, en letero datita 10.VII.1905 sendita al la franca oftalmologo d-ro Émile Javal, li skribis jene: "Tre agrabla surprizo estis por mi sciigo, ke vi kaj s-ro Moh apartenas al tiu sama raso al kiu mi mem apartenas. Des pli bone mi sentos min en Via gastama domo." (*Leteroj de Zamenhof*, vol. I, p.167). Post la tria Uniuersala Kongreso en Kembriĝo, Zamenhof iris al Londono, kie li gastis ĉe alia judo, Felix Stone Moscheles, brita portretopentristo kaj baptofilo de Felix Mendelssohn. Okaze de tiu vizito en la angla ĉefurbo, Zamenhof estis intervjuita de Izidoro Harris. La esperanta traduko de la angla teksto de la intervjuo, kiu aperis en *Jewish Chronicle*, estis farita de N.Z. Maimon (*La kaŝita vivo de Zamenhof*, p.161-173). Unu el la demandoj, kiun faris Harris, kiu mem estis esperantisto, temis pri la nombro de judaj esperantistoj. Zamenhof taksis ilin tiutempe je 300 kaj, parolante pri eminentuloj, menciis, krom la du francoj nomitaj ĉi supre, ankaŭ kelkajn judajn esperantistojn, kiujn li konis. Sed en tiu intervjuo ne estas unu vorto pri la usonano Henry Phillips, do estas preskaŭ certe, ke Zamenhof dum sia relative mallonga perleterita kontakto kun Phillips, ne sukcesis ekscii ke ankaŭ la unua amerika esperantisto estis judo.



Biographical Note About The Author:

Bernard Golden (Csikasz u. 11.III.3, H-8200 Veszprém Hungary) was born in New Jersey in 1925 and educated in New York City. He specialized in languages, later turned to anthropology and archaeology, receiving his MA at Columbia in 1953. In 1954 he did graduate work at the University of Chicago and studied in Mexico, England, France, Spain and Italy. He engaged in archaeological research in those countries and in Guatemala, Sweden, East and West Africa and Hungary. At present he is an archaeologist on the staff of the Bakony Museum in Veszprém, Hungary, where he has resided since 1971. Golden and his wife, Eva de Chatel (Veszprém, have two sons, Daniel and David.

He first became interested in international languages in 1946 when he learned Esperanto and was active in the New York club during the 40s and 50s. He is a lifetime member of UEA and one of its specialist delegates in Esperantology and interlinguistics as well as archaeology. Recently he has devoted his time to writing about various aspects of the international language movement. He is a regular contributor to UEA's *Esperanto* and *Eco-Logos* as well as other Esperanto periodicals. Several of his short stories written originally in Esperanto have won prizes in international literary competitions. Articles on archaeology in Esperanto have been published, as well as translations from Hungarian literature prepared in collaboration with his Esperantist wife.

Golden's article in *Eco-Logos* (3:1978) "The False Prophecy of Petro Stojan" is a fine piece of scholarship on one of the outstanding scholars in the field in interlinguistics.

La prelego de D-ro L. L. Zamenhof ĉe la 6a Intericia Esperanto-kongreso, Washington, D.C., aŭgusto 1910.)

Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin lutas! Lando pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas ultaj suferantaj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin lutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ ia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj ĝiaj honestaj filoj, mi inas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto ĉarmis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidamarismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro ĉiris nin al via bordo; ni venis al vi por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj midealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi, kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksdevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkigu ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, vivante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve albuti unu la alian. Ni esperas, ke danke al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similigos al niaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom, unuigitan, kve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun vivas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldaŭ eĉe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra via tuta kontinento.

PSŬDO-ESPERANTISTO

de L. L. Zamenhof

De tempo al tempo ni ricevas de diversaj flankoj leterojn malpli en la maniero de la sekvanta letero de s-ro X., kiu iŝas nun antaŭ niaj okuloj:

“Jam longe mi ne skribis al vi, kaj vi kredeble jam pensas, ke mi, mi varma amiko de la lingvo Esperanto, nun jam forgesis pri ĝi. Se tiel kredas, vi eraras. Mi ĉiam restos varmega amiko de Esperanto kaj mi neniam ĝin forgesos. Sed kiam mi komencis siatempe labori por Esperanto, mi renkontis tiom da malfacilaĵoj, ke mi vole-ne-vole devis lasi fali la manojn, kaj venis al la konvinko, ke nun la mondo estas ankoraŭ matura por tiu granda ideo. Sed estu tute certa, ke am nur la cirkonstancoj ŝanĝiĝos kaj la surdeco kaj indiferenteco de la mondo pasos, vi tuj vidos min en la vicoj de la plej energiaj batalantoj. Skribu al mi, kion nia afero faris de la tempo, kiam mi ek ekzistis esti aktiva esperantisto; kiom da amikoj la afero nun havas? Ĉu aj novaj verkoj eliris? Se la “Esperantisto” ankoraŭ eliras, sendu al mi sian numeron de ĝi.

Entute estus bone, se vi de tempo al tempo sendus al mi ian novaĵon pri Esperanto, por ke mi ne tute forgesu pri ĝi... ktp., ktp.”

Ne vere, amikoj, kia edifa kaj grandanima maniero de pensado? Ĉu dank’ al niaj senlacaj, paciencaj kaj malfacilaj laboroj nia eo fine venkos, kiam ni povos iam deviŝi la ŝviton de niaj fruntoj kaj, post la eternaj ĉagrenoj, malagrablaĵoj kaj mokoj, levi la kapon kaj rigardi kun plezuro la fruktojn de nia laborado, tiam sinjoro X. al aliĝos al ni kaj post la venko li fariĝos unu el la plej energiaj batalantoj! Dume “la mondo ne estas ankoraŭ matura”, kaj tial s-ro

X. en tia grado ne povas esti “aktiva esperantisto”, ke li ne povas eĉ...por sia propra persono aboni la “Esperantiston”, kiu “havas por li ĉiam grandan indon”, kaj sian aldonitecon al nia afero li esprimas per tio, ke li petas nin, havantajn tro multe da libera tempo, skribadi al li de tempo al tempo pri la stato de nia afero.

Ne, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj! Estas vero, ke ĉia nova utila ideo en la komenco devas tre malfacile batali kaj pli aŭ malpli frue ĝi venkas. Sed kiam dank’ al nia konstanteco la mondo fine ĉesos esti surda al niaj vortoj kaj nia afero ĉesos esti “fantazio, pri kiu la bona tono postulas, ke oni ĝin moku, ne esplorinte ĝin”, kiam Esperanto estos eĉe akceptita kaj sankciita, - tiam ni vin ne bezonos, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj.

Vi faris malgrandan proveton de laborado, kaj kiam ĝi restis sen deca sukceso, vi tuj ĉesis! Sed se nia laborado apartenus al tiuj dankoportaj aferoj, kiuj estas kronotaj de tuja granda sukceso, tiam ni ja facile trovus milionojn da laborantoj kaj tiam ni ja vin ne bezonos! Vi ĉiuj (via nombro estas jam tre granda), kiuj staras nun kaŝite kaj atendas, - ne promesu aliĝi al ni, kiam la mondo maturiĝos, ĉar tiam ni jam ne bezonos maturigantojn kaj post la venko ni ne bezonos helpantojn. Se vi amas nian ideon, laboru por ĝi nun, kiam ĝi bezonas laborantojn; batalu por ĝi nun, kiam ĝi postulas ankoraŭ malfacilegan bataladon; staru forte kaj nekaŝite, kiel granito inter ondoj nun, kiam la malfavoraj cirkonstancoj tion eĉ postulas; oferadu malavare nun, kiam monaj rimedoj estas por ni eksterordinare gravaj kaj enhavas en si la demandon: “esti aŭ neesti”.

Ĉia nova ideo devis batali longe kaj malfacile, kaj vi, sinjoroj X. kaj similaj, kiuj ĝuas nun la dolĉajn fruktojn de tiuj ideoj, vi eble ne havas eĉ supozeton pri la maldolĉa ŝvito, kun kiu oni siatempe semis tiujn ideojn. Ni, veraj amikoj de lingvo tutmonda, scias tion eĉ tre bone, kaj ni laboras pacience, pacience, pacience, kaj nek la tuta terura surdeco, kiu regas ĉirkaŭ ni, nek la malkuraĝigaj, malesperigaj batoj de la sorto, kiujn ni renkontas sur ĉiu paŝo, forpelas nin de nia vojo. Armitaj per tiu ĉi fera pacienca kaj per la konscio de la vereco de nia ideo, ni iras antaŭen malgraŭ la malhelpoj, kiuj baras ĉiun nian paŝon, kaj ni ne dubas, ke pli aŭ malpli frue ni venkos. Sed vi, sinjoro X. kaj miloj da similaj personoj, kiuj preferas atendi ĝis la ideo nun mokata kaj persekutata fariĝos ideo moda, atendu trankvile, - sed ne nomu vin esperantistoj. Ni batas nun la dikegan muron, kiu staras inter la popoloj; cent batoj restas sen rezultato, sed ni ne perdas la paciencon kaj estas kontentaj, kiam la centunua elrompas unu brikon. Enea estas tiu ĉi malrapidea laborado, sed ni ĝin ne ĵetos. Kaj kiam la milionoj da internaj fendoj, kaŭzita de niaj paciencaj batoj kaj ĝis nun tute kaŝitaj, subite ekfikos, kiam la murego, subrompita en diversaj lokoj, en unu fojo kun grandega bruo subite disfalos, tiam vi, miopuloj, miros, kiel ĝi okazis, kiam ja hieraŭ ankoraŭ 99/100 de la murego staris netuŝita; tiam vi alkuros al ni, grandanime helpos al ni triumfi la venkon, kaj vi diros: “ni laboris”. Sed la historio tiam ne silentos, sed diferencigos inter la laborintoj kaj la atendintoj.

(el *Originala Verkaro*)

EL LA MISVOJO

Post densa mallumo ekzistas abismo,
al kiu la lingvo rapidas;

Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.

Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,

Pri l’tempoj pasintaj pensante;

Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,

Ni plendas kaj plendas konstante.

“Laboru kaj fidu!” la homoj nin petas,

“Neniam!” en ĥoro ni krie ripetas,

Obstine gruntante – neniu nin dankos,

Sed tamen la plendoj ne mankos.

La okulisto skribis post noktmezo.
Kiam la homa gefrataro pacos?
Kia mistera manko, kia lezo
duonblindigas? Kiu ĝin kuracos?
Kaj kion povas fari unuopa
malriĉa homo por homar' miopa?

La okulisto verkis kaj parolis,
tradukis, organizis. Kaj la skvamoj
de kelkaj okulparoj jam forfalas,
la antaŭjuĝoj, timoj kaj malamoj.
La okulisto mortis dummilite,
ne plenvenkinta, ne; sed ne venkite.

el **ESTAS MI ESPERANTISTO**

– Julio Baghy

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido;
"Bonan tagon! Ĉis revido!"
Ĉis sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

el **LA VERDA BIBLIO**

– I. Lejzerowicz

Ĉapitro I

1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon. 2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. 3. Kaj la senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto. 4. Kaj la Spirito vidis Esperanto, ke ĝi estas bona; kaj la Spirito apartigis Esperanton de Volapük. Kaj la Spirito nomis Esperanton Eterna Tago, kaj Volapükon nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno – unu tago.

Ĉapitro X

1. Jen estas la festoj, kiujn mi starigas por vi. 2. Eterna interligo inter mi kaj vi estu tiuj festoj - La Universalaj Kongresoj. ... 4. Ĝoju, ĝoju, mia verda popolo kun timpanoj kaj tamburoj eliru en la stratojn. ... 9. El ĉiuj anguloj de la mondo kunvenu kaj ripozu ĝojplene. ... 13. Fotografu kaj ekskursu. ... 15. Kantu, dancu, kaj amu. Ĉio ĉi estas donita al vi por via vivo kaj feliĉo. ... 17. Memoru, ke festo de neniofarado ĝi estas – la sabato de la jaro.

Ĉapitro XIV

El la prediko de la Profeto Kalsurmano Galoŝej en kiu li admonis Plibonigon de la TAGO DE LA LIBRO ke oni ne ripetu la banalaĵojn, kiel, ekzemple,

1. nur serĉadon de ĝojo, kiel ĉiam
2. kantadon de la himno, kiel ĉiam
3. forgeson ke estas ĝuste la Festo de la Libro
4. Kial ĉiujn serĉadon de verdaj libroj, kiel ĉiam

Dum naŭdek jaroj
la obstinaj baroj
ankoraŭ ne dissaltis.

Batalantoj pacaj
dormemaj, lacaj
militojn eĉ ne haltis.

La strukturo
de la ĉina muro
pli kaj pli dikiĝas.

Nova sento,
facila vento
ne alproksimiĝas.

"Kurteno fera",
peza, severa
dividas la familian rondon.

Nur defio
kaj envio
arigas la "trian mondon".

Ĉiuj trajtoj
de homaj rajtoj
estas sufokataj.

La sola frukto
de "UNO"-lukto-
la lingvoj parolataj.

En UNESKO
daŭra kresko
de babelaj turo.

Konsultaj rilatoj
de niaj delegitoj
kaj miljara muro.

Se nian revon
kaj la devon
ĉiam ni memoros.

Se sincere
kaj kohere
de nun li laboros

Ne letargie
sed energie
sur Zamenhofa fundamento

Ni rekaptos la relon
atingos la celon
ĝis fino de l' jarcento.

**Eĉ guto malgranda
konstante frapanta
progresas, ho Dio,
tro lante.**

"...Dr. Zamenhof is honored best by those who speak his language."

from "Doctors Afield", E. J. Lieberman
New England Journal of Medicine
November 5, 1959

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco. (Artikolo 1 el Universala Deklaro de Homaj Rajtoj)

All people are by birth free and equal with respect to dignity and rights. They possess reason and conscience, and must treat one another in a spirit of brotherhood. (Article 1 of the Universal Declaration of Human Rights)

ESPERANTO AND TRANS-NATIONAL IDENTITY: The Case of Dr. Zamenhof

– E. James Lieberman, *Intl. J. Soc. Lang* 20(1979) pp.89-107

"Language is the autobiography of the human mind."
– Max Müller, *The Science of Thought*

Language, both tool and symbol, distinguishes the human community from other animal societies, permitting us to transmit messages across reaches of space and time. Language reflects and transmits human differences - separateness, misunderstanding, disagreement - as well as similarities, harmony, communion. ...

Ludovic Lazarus Zamenhof (1859-1917), the first-born of nine, grew up in the multilingual world of Białystok in a Lithuanian province of Poland under Russian rule. Speaking Russian at home, he heard and learned Yiddish, Polish, German and Byelo-Russian in the community and Hebrew in the synagogue. His father, Marcus, a teacher of languages, translator and official censor, was an atheist intellectual who favored Jewish assimilation into the dominant culture. A strict disciplinarian, sometimes capable of compassion, e.g. when Ludovic or his mother would intercede on behalf of a younger sibling, Marcus valued education and saw three of his four sons become physicians and one a pharmacist. Ludovic was the favorite of his father and his mother, a warm, idealistic woman who was quite religious.

By the age of five, Ludovic could read and write fluently. He knew several languages well. This precocity must reflect more than innate capacity: certainly his father's special interest in languages and in assimilation provided an impetus. Ludovic was probably encouraged to listen to and speak with a variety of people. A child so young would not easily grasp an additional language for which he had no positive feeling. Conversely, great facility with language at such a tender age must have endeared him to diverse ethnic acquaintances, making him feel unusually accepted and secure in the wider community.

Later, the pain of discrimination, including pogroms, would be felt more keenly than if he had been isolated from or inured against intercourse with those outside his ethnic boundary. The patterns of discrimination were complex: Jews, although often badly treated, were numerous in Białystok. Poles were in the majority but under Russian rule were denied the opportunity to develop and flourish in their native tongue.

The young polyglot bridled at the cruel – and to a child, logically absurd – subordination of one people by another on the basis of language. Why did he not accept man's inhumanity and live down the outlandish childhood wish for mutual respect in human relations? ...

"If I were not a Jew from the ghetto, the idea of unification of mankind either would not have come into my head, or would not have held me so obstinately throughout my entire life. No one feels so strongly the necessity of a non-national language, neutrally human, as a Jew, who has to pray to God in a long dead tongue, be educated in a language of a people who reject him, and who has fellow sufferers around the world and cannot communicate with them." (Zamenhof wrote this in 1912) ...

I can think of no sociolinguistic area which has facts, texts and living subjects readily available for objective study and which has been comparably ignored or prejudged by scholars, scientists and internationalists of various kinds who might be expected to regard the matter with open-minded interest. Indeed, the academic disregard of Esperanto is worthy of study in its own right. (Governmental hostility toward, and discrimination against, Esperanto has been rampant in repressive societies and in wartime - Sadler and Lins, 1972) ...

Published in 1887, Esperanto came early in relation to modern technology of communication. The telephone was invented in 1876 and was in widespread use by 1900; by 1897 phonograph records were being made commercially; radio broadcasting began in 1920, and commercial aviation developed extensively between the World Wars (Ware, et al 1966:300, 311-313) ...

Today more of us inhabit a multilingual world...at the same time there is a decline in second-language teaching. ...

Esperanto could raise most students a giant step in foreign language mastery. More "learners" can become bilinguals, and more weak bilinguals can go on to real fluency. The identity implications are twofold; first, "I can use a second language" is a rare and valuable feeling for most of us. Second, meeting other people half way is a practical, positive experience, integrating humility with assertiveness at a time when "populist" diplomacy needs more of both.

Zamenhof, prototype of multicultural man at a linguistic frontier, reflects these combinations of strength and vulnerability. In the midst of sociolinguistic chaos he felt disturbed; in the solitude of his multilingual mind he found order and gave the common man a new "tool for conviviality" (Illich 1973), a bridge between peoples where the ruins of an ancient tower had stood. Students of language and identity can only profit from attention to his life and work and its rener-

There follows an English translation (by Conrad Fisher) of Dr. Zamenhof's speech to the Preparatory Conference of the Esperantists of Russia at St. Petersburg, 1910, which should explain why. The Esperanto original appears in the next column.

Esteemed ladies and gentlemen! Perhaps you will wonder why I am speaking to you not in Russian, but in Esperanto; perhaps you will say that, since we are now holding a congress of citizens of the same realm and all, or at least nearly all, its participants understand very well the same language, it is much more natural to speak to you in that language. However, there are important reasons why I chose for my talk that language for which we are fighting and for which we are meeting.

Our congresses, not only the universal ones, but the national ones, have above all an instructive and educational significance. Esperantists, scattered in different cities and towns, meet in a more or less large mass to hear our language, to check on whether they have correctly mastered the language, whether they understand it well, to compare their own manner of speech with the accept of more experienced esperantists. When they later return home, they not only speak more purely themselves, but they bring back a model of good speech to those who stayed home. Thus, the congresses regulate the usage of the language, and thanks to our congresses Esperanto is now spoken uniformly not only in the distant corners of every separate country, but in the most diverse places of the globe. Already when we hear a good and experienced Esperanto orator, we can in no way guess the nation or country to which he belongs. The entire autonomous life of our language, with its own spirit, in no way borrowed or imitating any other, is ever more strengthened in that way, as if esperantists of the world lived together on one small piece of ground.

No less important is the educational significance of the Esperanto congresses. Isolated esperantists, who never had the possibility of applying in practice what they've learned, often doubt if they could really become understood when they speak Esperanto. Even within the Esperanto clubs, they are often afraid to speak in Esperanto, they stammer, they prefer to speak in their own national language, and in proportion to the lack of courage in speaking Esperanto there also appears a lack of boldness in promoting it, because the esperantists who speak it haltingly in spite of themselves are not able to free themselves from the fear that perhaps Esperanto after all is only a more theoretical matter than a practical one. But when the stammerer comes to the congress, he has a chance to hear good and experienced Esperanto orators, when he becomes convinced with his own ears and eyes, how beautifully and fluently Esperanto can be spoken, he becomes enthusiastic, he sees that he is working for something living and full of life, he returns home with new courage and energy. Our congresses, not only the universal, but also the local ones, thus educate convinced consequently enthusiastic fighters for our cause.

That's why in all our congresses we must all speak not only about Esperanto, but in Esperanto, not only in the universal, but also in the national and regional ones.

Parolado ĉe la Solena Malfermo de la Preparatory Konferenco de Ruslandaj Esperantistoj en St. Petersburg 1910 (el *The British Esperantist* VI.1910, n-ro 69 paĝo 168)

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Vi eble miros, kiel mi parolas al vi ne ruse, sed esperante; vi eble diros ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen grava kaŭzo, pro kiu mi elektis por mia parolo tiun lingvon por kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukatan Esperantistoj, disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiu plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun kiam oni aŭdas bonan kaj spertan esperantan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la eduka signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere edukas konvinkitajn, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto.

"Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia.

– L. L. Zamenho

Okaze de la centjara datreveno de naskiĝo de Zamenhof, 15an de decembro 1959, Poul Thorsen verkis kaj mem laŭtlegis sian poemon, "Prologo". Jen la unua strofo:

Hodiaŭ
en moment' solena
en lingvo Zamenhofa, pura, plena,
facile fluas vortoj, varme, verse
karesi noblan nomon kvazaŭ per Alta Kanto:
Doktoro Esperanto.
Hodiaŭ
ritmo, rimoj kun dolĉo dance festas
pro verko, kiu mem poemo estas.

En sia *Unua Libro*, Zamenhof skribis sur la unua paĝo: "Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia." La plej taŭga omaĝo al Zamenhof estas paroli lian lingvon.

Kiam Grafo Leo Tolstoy en 1894 rekomendis studon de Esperanto, li skribis: "La ofero estas tiel malgranda kaj la eblaj rezultoj tiel egaj por la homaro ke neniu devus rifuzi la provon."

En unu verko Kafka skribis pri viro kiu iris al la pordo de iu instanco kaj petis eniron. La pordisto respondis ke li devas atendi. Li atendis horon post horo, tagon post tago, kaj eventuale jaron post jaro. Ĉiam la pordisto donis la saman respondon: "Vi devas ankoraŭ atendi." Finfine, post multaj jaroj li faris al la pordisto alian demandon: "Kial mi estas la sola kiu venas al tiu ĉi pordo?" Respondis la pordisto: "Ĉar tiu ĉi estas via pordo kaj...nun mi fermos ĝin." Kiom ofte ni sidas antaŭ malfermitaj pordoj?

Humila,
saĝa, preskaŭ sola
li luktis por la lingvo senpopola,
ĝis muroj de Bulonjo krake falis.
De tiam li kun daŭre kreskanta akompano
fariĝis tutmondano.
Humila,
ne venkinta, sed ankaŭ ne venkita,
li montris vojon tra la mont' granita.

— el *Memorlibro*, P. Thorsen

Homaranismo estis esenca parto de la idealo de Zamenhof. Li estis praktika idealisto. Li vivis sian homaranismon.

Kutime kiam oni ekzamenas librojn, jam en la antaŭaj paĝoj oni legas la kondiĉojn de la kopirajto. En la *Unua Libro de Esperanto*, Zamenhof skribis:

"La Internacia Lingvo, same kiel ĉiu NACIA estas socia propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi."

Ankaŭ en la *Unua Libro*, Zamenhof notis ke la diferenco de la lingvoj prezentas grandan malhelpon inter popoloj. De la komenco, baza estis la "interna ideo" de Esperantismo. Zamenhof estis tolerema homo sed li vere malŝatis la ŝovinistojn kiuj pretendis amon al la patrujo sed samtempe predikis malamon kontraŭ najbaroj. En la *Originala Verkaro* (p. 382) ni legas:

"Vi semantoj de malpaco...parolu pri egoismo, sen **neniam** uzu la vorton 'amo' ĉar en via buŝo la sankta vorto 'amo' malpuriĝas."

Hardita
kontraŭ falsaj frazoj
li semis toleremon inter rasoj.
"La naciismo naskas la militon,
La homo estu homo, egale kiulando!"
La homarano granda
hardita
pro malvarmo de cerboj kaj de koroj
rezignis pri havaĵo kaj honoroj.

(el *Memorlibro*, P. Thorsen)

En ĉiu universala kongreso, de la unua en Boulogne sur Mer ĝis 1912, Zamenhof klarigis per memorinda malferma parolado siajn ideojn pri toleremo kaj homaj rajtoj. Li konsilis ke homoj interrilatu laŭ la Ora Regulo jene:

"Ne faru al la ceteraj tion kion vi ne ŝatus ke oni faru al vi."

Sekvas du mallongaj paragrafoj kiujn Edmundo Privat verkis. Privat konis Zamenhof de kiam junaĝe kaj verkis la biografion *Vivo de Zamenhof*.

"La unua mondmilito en 1914 estis kruela bato al tiu granda amiko de la homaro. Rusaj kaj poste germana armeoj okupis Varsovion dum li jam suferis je grava kormalsano. En 1916 li verkis 'Leteron al Diplomatoj por rekomendi ke oni ne nur pripensu la nurajn ŝanĝojn de landlimoj, sed garantiu la lingvaj kaj religiajn rajtojn de la malplimululoj..."

"D-ro Zamenhof mortis en aprilo 1917. Lia Internacia Lingvo perdis dufoje per mondmilitoj grandan parton de siaj adeptoj kaj bibliotekoj, sed dufoje reviviĝis kaj revastiĝis. Nun ĝin uzas ne nur Esperanto kongresoj sed aliaj mondkonferencoj teknikaj aŭ specialistaj, ekzemple kunvenoj edukistaj, katolikaj, protestantaj, turistaj, laboristaj, ktp. Ĉie, kien ĝi penetras, ĝi enkondukas ankaŭ iom de la homara spirito, kiu inspiris ĝian iniciatoron Zamenhof. Laŭ pure lingva vidpunkto ĝi evoluas kaj kreskas laŭ la natura maniero, kiun li antaŭvidis."

Hodiaŭ
en moment' solena,
jam tempo estas por rekono plena.
La nepoj de l'modesto SEMOKORTO
centmilo tra Tutmondo persiste venis, venas,
konstante semis, semas.
Hodiaŭ
estas tempo, honora kaj hereda —
per vi la verko venkos, estu preta!

(El *Memorlibro*, P. Thorsen)

— Cathy Schulze, prelego ĉe SFERO bankedo, 1980

**December is ESPERANTO BOOK MONTH
Give an Esperanto Book!**

ESPERANTO FIRSTS

According to the first edition of *ENCIKLOPEDIŬ DE SPERANTO*)

- First Esperanto book - July 26, 1887.
- First Address Book - 1000 addresses of persons who were learning Esperanto - 1889, Warsaw.
- First article about Esperanto - in *Kurjer Codzienny*, Warsaw, August 7, 1887. Title: "Anti-Volapük."
- First religious service with singing in Esperanto - October 26, 1896, in the Catholic church of Smolensk, Russia.
- First original drama in Esperanto - 1910.
- First Esperanto Encyclopaedia - 1934, Hungary.
- First Esperanto Film - the funeral of Zamenhof, April 17, 1917, shown in the Uranja Theater, Warsaw.
- First Esperanto periodical - *LA ESPERANTISTO*, September 1, 1889, Nürnberg, Germany.
- First marriage of two Esperantists - 1899, A.V. Langlet and S. Blomberg.
- First conversation between Esperantists of different countries - Postnikov (Russian) visiting in France, 1889.
- First international recognition of Esperanto as a "clear" language for telegrams - 1924. Proposed by the League of Nations, accepted in 1925 by the Universal Telegraphic Union.
- First international Esperanto convention - 1905, in Boulogne-sur-Mer, France.
- First lector of Esperanto in an upper school - April 17, 1917, Josef Schamanek in the Technische Altschule, Vienna.
- First Esperanto literary contest - 1896, St. Petersburg, Russia.
- First government minister who gave a speech in Esperanto - 1911, Conybeer during the first Esperanto convention in Australia.
- First monument to Zamenhof - 1914, in Franzensbad.
- First opera presented in Esperanto - 1912, "Halka", during the international Esperanto convention in Cracow, then under Russian rule.
- First poem written originally in Esperanto - 1887, "Mia Penso" by Zamenhof.
- First postage stamp with wording in Esperanto - 1925, USSR, "Popov - Inventisto de Radio" Two face values: 7 kopeks, 14 kopeks.
- First postal cancellation in Esperanto - 1912, "KONGRESO ESPERANTISTA", used on mail deposited at the international convention, Cracow.
- First radiotelephonic communication in Esperanto - April 3, 1930, between A. Couto Fernandez, Rio de Janeiro, Brazil, and E. Houbert, Paris.
- First street named for Zamenhof - 1912, Sabadell, Spain.
- First head of a government who greeted an Esperanto gathering in Esperanto - 1929, President Miklas of Austria.
- First government to be represented at an Esperanto convention - 1907, Belgium, at Cambridge, England.

- First theatrical presentation in Esperanto - September 27, 1896, the comedy "Brandfaristo" (Tolstoy), at Smolensk, Russia.
- First theatrical presentation in Esperanto by professional actors - 1908, "Ifigenio en Taurido" (Goethe), at the international Esperanto convention.
- First telegram sent in Esperanto after its acceptance as a "clear" language - November 1926, sent by Brita Esperantista Asocio to the Radio Exhibition in Dublin.
- First travel trip made using Esperanto - 1895, V. Langlet and Etzel, in Russia.
(thanks to Conrad Fisher)

JEN OMAĜOJ AL NIA LINGVO DE DU EL LA PLEAMATAJ ESPERANTO-POETOJ: Kalocsay kaj Baghy.

La fundamento kaj la palaco

— D-ro Kaloman Kalocsay
(el *Ora Duopo*)

Ho Esperanto, mia temo
amata, kiam la kantemo
min kaptas, vidu, lastatempe
min jam minacas anatemo,

ĉar mi kuraĝis vin tro ami,
jes, oni volas min proklami
hereza, ĉar per nova brilo
kaj riĉ' mi volas vin ornami.

Sed mi toleras sen lamento;
defendas min la argumento:
palacon pompan alpostulas
la pompe firma fundamento.

Ni do konstruu sen ŝancelo
tiun palacon de la Belo.
Por kiuj fundament' sufiĉas,
nu, tiuj loĝu en la kelo!

Al nia lingvo

— Julio Baghy (el *La Verda Koro*)

Vi, bela lingvo, Esperanto,
en mi la penso jam ne mutas;
parolas sentoj en la kanto,
per kiu vin mi nun salutas.

Ho, kie estas via lando? —
demandas homoj. La respondo:
La lingvoland' de Esperanto
jam estas nia tuta mondo!

Al tuta mond' vi apartenas,
al alto levas vi la Homon
kaj kiu vin en koro tenas,
de vi ricevas Belon, Bonon.

En homan mondon venas Amo
per Nova Sento, kormuziko;
Vi faras Pacon el malamo
kaj fraton el la malamiko.

Vi donas al mi, Esperanto,
kulturon novan kaj laboron...
Sed kion donu mi, lernanto?
Akceptu mian tutan koron!



BONAN MATENON, MAJSTRO

Bonan matenon, Majstro! Sidiĝu, mi petas.
Kiel vi fartas post kvindekjara malvivo?
Bonvolu fumi. Nu, vi certe enketas
pri la Movado, kaj l'nuna perspektivo?
Nu, ni laboras. Sed – vi scias – la homoj
estas inertaj, altaj estas la baroj,
malfavoras l'epoko; militoj, pogromoj
minacas; nin ignoras la registaroj.
Jes, jes, en via tempo, estis simile;
vi tamen ne povas kompreni, kio nin frontas –
atingi l'orelojn estas malfacile,
kaj kiam la homoj mokas nin, ni hontas.
Nu jes, vi multe oferis. Ni mem kelkfoje
donacis kelkan monon, sed ni malriĉas.
Ne pensu, ke ni nenionfaradas survoje!
Al ata-ita ni multe da tempo dediĉas!
Mi diris, ke per ignoro stulte obstina
la registaroj aŭskulti nin rifuzas?
Eĉ pli malbone – la registaro ĉina
por siaj propraj celoj la lingvon uzas!
Ni lernis la lingvon, kaj kiam ajn ni kunvenas
ni krokodilas...Kio? Ja nacilingve
babili...Ĉar komencanto ne komprenas,
kiam ni Esperanton parolas svinge.
Nu, Majstro, estis agrable...Ĝis la revido;
ĝojos pro via vizit' la samideanoj.
Vi povas reiri la tombon kun forta fido,
ke via afero troviĝas en bonaj manoj.

William Auld el *Humoroj*

Esperanto League for North America, Inc.

P. O. Box 1129

El Cerrito, CA 94530

Tel. [415] 653-0998